

LA EVANGELIO – NASKO DE LA ĜOJO

„*La spirito de la Eternulo estas sur mi, ĉar li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj.*“ Luk 4,18

La unua heroldo de la ĝojo de la evangelio estas anĝelo Gabrielo. Zeharjan li certigas, ke al li naskiĝos filo, kiu al li alportos „*ĝojon kaj feliĉon, kaj multaj ĝojos pro lia naskiĝo*“ (Luk 1,14). Duonjaron pli poste eksonas la vortoj de la anĝelo: „*Ĝoju!*“ tute silente, en kaŝiteco de hejmo de Maria. „*Dio decidigis eniri historion pere de Vi!*“

Kaj tiel okazos: en Ŝi la ĝojo surmetas korpon. Pere de Ŝi la ĝojo enkorpiĝas. Ĝojo de Dio iĝas videbla, aŭdebla, palpebla. Ĝi estos kruele rifuzata, rigore atakata, sed same tiel freneze amata, arde admiranta. Ĝojon oni ne povas reteni. Ĝi tuj ekiras, ekkuras sur galileaj montetoj kaj dancas sur judeaj altaĵoj. Estas tio ĝiaj unuaj paŝoj survoje, kiu neniam finiĝos, ili direktos tra ĉiuj vojoj de la mondo, en ĉiuj geografiaj larĝoj kaj longoj, transe de jarcentoj kaj jarmiloj. Neniu kaj nenio plu la ĝojon haltos sur ĝia vojo. Ni povas antaŭ ĝi brufermi pordon, malsuprenigi barieron, punekzili ĝin... vane, ĝi trairos aliloke. Ĝi trabatos al si vojon eĉ tra plej profunda arbaro, tra plej netrairebla dezerto, tra plej ondanta maro. Kaj kial? Por ke ĝi atingu ĉiun koron soifantan la ĝojon.

Rigardu, kiel ĝojo ekloĝis en Elizabeto. El sino de juna Maria, kie la ĝojo estas kaŝita, ĝi trapenetros al etulo Johano, kiu ankaŭ estas kaŭriĝinta en la sino. Ĝi lin plenigos. Kaj li sin ekmoviĝos pro neesprimebla feliĉo. Li kvazaŭ farus danĉpaŝon. Li ankoraŭ ne scias – sed lia patrino jes – ke Davido ankaŭ saltetadis ankaŭ kesto de la interligo.

Ĝojon oni ne povas reteni, ne eblas ĝin

ĵaluze gardi. Ĝi ne povas alion ol sin disdonadi, disverŝadi, same kiel lumo ne povas alion ol brili. Apenaŭ la ĝojo dancigas la etan Johanon Baptiston, sen forlasi lin, ĝi revenas al sia fonto: per alfluo de tiu ĉi ĝojo ekĝojegas frukto en la sino kaj elpruntas lipojn de sia patrino: „*Mia spirito ĝojas en Dio!*“ La magnifikaton mem Li pli poste elkantos per siaj vortoj: „*Mi Vin glorias, ho Patro, Estro de la ĉielo kaj la tero, ke Vi kaŝis ĉi tion for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al infanetoj!*“ (Luk 10,21).

La etulo Johano ne kapablas aliel respondi al vokado de sia Dio. Li ne povas paroli. Li povas danci. Li iĝos escepta profeto de la ĝojo. Li plenumos antaŭdiron, donitan fare de anĝelo al lia patro Zeharja. En la momento, kiam li retiriĝos en flanketon, li eldiros tiujn ravajn vortojn: „*Mi ne estas Kristo, (...) sed la amiko de la fianĉo, kiu staras kaj lin aŭdas, tre ĝojas pro la voĉo de la fianĉo; ĉi tiu mia ĝojo do plenumiĝis!*“ (Joh 3,28-29).

Por enpensigo

Kiu staris ĉe naskiĝo de nia kredo, kiu estis nia unua heroldo de la ĝojo? Ni ĝoju kune kun Johano Baptisto pro voĉo de la fianĉo, pro voĉo de Jesuo, pro liaj vortoj kaŝitaj en la Sankta Skribo.

Preĝo

Sinjoro Jesuo, mi dankas por tiuj, kiuj perigis al mi la ĝojan mesaĝon kaj alkondukis min al la kredo je Vi. Donu, ke mi ĉiam volonte aŭskultu vian voĉon kaj mi ĉiam agu laŭ ĝi. Amen. ■

Laŭ libro de Daniel Ange: La joie
(Fonto de ĝojo)